

**Redakta noto**

Fakte ĉiu scienca artikolo, same kiel ĉiu sciencnivela parolado, estas traduko. La aŭtoro aŭ la parolanto donas literan resp. parolan esprimon al siaj internaj sentoj kaj pensoj. Ili ambaŭ provas trovi la konvenajn vortojn, kiuj plej taŭge peras – do, tradukas – al la aŭskult-antaro aŭ legantaro la enhavan esencon. Ĉar ĉiuj homoj diferencas de la aliaj kun ĉies propraj vortrezoroj, parolturnoj, dir- kaj esprimmanieroj, fakte ekzistas tiom da esprimebloj kiom ekzistas parolantoj kaj aŭtoroj, legantoj kaj aŭskultantoj.

Kiu parolas kaj verkas artikolon, tiu tradukas tion, kion li volas peri al aliuloj. Tiu, kiu aŭskultas aŭ legas, tradukas la vortojn kiuj atingas liaj oreloj aŭ kiujn vidas liaj okuloj, en la ideon de lia propra imago, do konkrete: en lian personan lingvaĵon. Bone "tradukis" siajn ideojn kaj pensojn tiu aŭtoro aŭ oratoro, kies fakan artikolon aŭ paroladon alifakuloj komprenas.

En la antaŭa kajero SR 2/2004 troviĝas en la lasta paĝo n-ro 104 la enhavolisto de la unua kajero de Scienca Revuo el la jaro 1949. Oni tie legas, inter artikoltitoloj kaj aliaj informoj, pri redaktora "alparolo al aŭtoroj kaj tradukantoj". Same kiel en la unua kajero de "Internacia Scienca Revuo" (vd. SR 1/2004, p. 3 - 12) do aperis ankaŭ en niaj unuaj sciencrevuaj kajeroj jen kaj jen tradukoj de artikoloj el naci-lingvaj periodaĵoj. Kvankam la "originalaj artikoloj" estu kaj restu la esenca parto de nia asocia organo, la traduko de fakartikoloj en Esperanton tamen ankaŭ plenumas nian statutan celon, nome peri sciadon el ĉiuj fakkampoj al diversfakaj esperantoparolantaj interesatoj pri sciencaj aferoj.

La okaza aperigo de tradukitaj sciencaj tekstoj – aŭ esceptokaze de artikoloj paralele en Esperanto kaj en la nacia lingvo de la aŭtoro – do ne malplialtigas la valoron de Scienca Revuo, sed povas eĉ esti grava penetra en neesperantaj rondojn. Mi celas eldoni la kajeron SR 1/2005 kiel tiuspecan "dulingvan SR-kajeron" – precipe kiel festkajeran omaĝon al la unua apero, en januaro 1904, de "Internacia Scienca Revuo".

En tiu ĉi kajero SR 3/2004 grandan parton plenigas prihistoria artikolo de nia fervora ISAE-ano *Gerhard Kalkhof*. En la ĉiam pligrandiganta Eŭropa Unio ja speciale gravas, ke niaj diverslandaj ISAE-anoj konu iom pli bone la historion de siaj najbarlandaj kolegoj cele al pli bona kaj pli malvastaj kompreno kaj kunlaboro.

Kun plej bonaj deziroj, prof. d-ro R. Sachs, prezidanto de ISAE

**La Granda Princo-Elektisto kaj Prusujo**

*KALKHOF Gerhard*

**1. Enkonduko**

Kiam post la Dua Mondmilito la kvar venkoregnoj super la faŝisma Germanujo – Usono, Sovetunio, Britujo kaj Francujo – proklamis en Berlino la 25-an de februaro 1947 (laŭ la leĝo n-ro 46 de la aliancita kuratora konsilio) la nuligon de la ŝtato Prusujo, ili "kiel plenvenkaj azenoj piedpuŝis leonon, jam delonge mortan". Tiel poste konstatis la germana historiisto *Golo MANN*.

Kion tiu eminenta historiisto esprimis per tio? Kio instigis lin al tia deklaro? Certe li malkovris staton, malaprobante fuŝagadon de la venkopartioj laŭ jenaj vidpunktoj: Serĉante kulpulon de la terura milito, oni kondamnis leonfortan, ne plu ekzistantan germanan ŝtaton, do Prusujon, kiel "vehiklon de militarismo kaj reakcio"; unufoje por ĉiam oni volis forigi la spiriton de perforteco kaj hegemonio el la germana teritorio, celante al Prusujo.

Certe tia Prusujo ne sole venkite ne povis defendi sin, sed ankaŭ ne povis pravigi sin antaŭ la juĝodecido de la mondohistorio, ĉar – tiel pravis *MANN* – jam delonge ĝi ne plu ekzistis. Vere, ĝi estis morta, estis nura kadavro, senpotencigata kaj englutata de germana imperio nove ekestinta antaŭ sepdek jaroj, kaj nun dispecigata en novaj landoj respektive aljuĝata al Pollando kaj Rusujo en sia nomdonanta parto, en la balta provinco Prusujo.

Tamen penvaloras esplori, kial *Golo MANN* nomas tian estintan ŝtaton "leono", kiel tiu ŝtato ekestis sinsekve de longa historia evoluo. Sed tia tasko estus tro ampleksa, pleniganta multajn volumojn. Tial sole mallonga epoko estu traktata, do, kiel unu el la plej elstaraj eminentuloj de la germana historio ne sole staris ĉe la lulilo de tiu ŝtato, sed ĝin eĉ kreis: La Granda Princo-Elektisto Frederiko Vilhelmo de Brandenburgio.